

Etnismo



INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

N-ro 105 - 30.06.2020

**HUNGAROJ 100 JAROJN
POST LA TRAKTATO
DE TRIANON**

**MONGOLIO RESTARIGOS
ŜIAN TRADICIAN
ALFABETON**

**INTERVJUO KUN
LINGVA AKTIVULO
VASILIJ ĤARITONOV**



**Meksika Nacia
Belarta Muzeo
ekspozicias
lingvan diversecon**

ANKAŬ LA PRAPOLOJ DEVAS FRONTI LA KORONAVIRUSON!

Etnismo

N-ro 105 - 30.06.2020

ELDONISTA LETERO

► Lingva revigligo: plej grava celo por etnistoj **2**

"VOĈOJ EL LA TERO":

► Meksika Nacia Belarta Muzeo ekspozicias lingvan diversecon **4**



LA DIVIDO DE AŬSTRIO-HUNGARIO (1919-1920):

► La traktatoj de Saint-Germain kaj de Trianon **7**

MONGOLIO RESTARIGOS SIAN TRADICIAN ALFABETON EN 2025 **11**

KONCIZE EL... **12**

FORPASIS HILLARY CHAPMAN **12**

IKEL-INFORMILO N-RO 83 **13**

INTERVJUO KUN LINGVA AKTIVULO
VASILIJ ĤARITONOV**14**

ANKAŬ LA PRAPOPOLOJ DEVAS FRONTI LA KORONAVIRUSON! **17**

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero de simpla numero kostas 5 €. Ĉiuj eroj de la "**IKEL-Infomilo**" estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honoraron. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti la kontribuojn.

La artikoloj publikigitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de **IKEL**, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Estraro:

- **Prezidanto:** *Alain FAVRE* (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com;
- **Vicprezidanto kaj redaktisto:** *Nicole MARGOT* (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: + 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
- **Grafiko:** *Ferriol MACIP i BONET* (kataluno)
Carrer de la Font Florida, 86, 1r 1a, 08004 Barcelona
Tel: +34 625 469 373, retadreso: farri@mac.com
- **Sekretario:** *Nikolas XIL CARVALHO* (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63, retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com
- **Kasisto:** *Xabier RICO ITURRIOTZ* (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ekz. ES-01005 Gasteiz,
Euskal Herria-Eŭskio, retadreso: xabirico@outlook.com
- **Rilatoj kun esperanto-gazetoj. Reviziado:**
István ERTL (hungaro),
22, rue Fautelfiels, LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com
- **Kunrevizianto:** *Nancy FONTANNAZ*
- **Estrarano:** *Hèctor ALÒS i FONT* (kataluno),
Mir pr. 15-55, RU-428024 Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat
- **Sociaj retoj:** *Aleksandr BLINOV* (ĉuvaŝo)

- **Retejo:** www.etnismo.org
- **Forumo:** etnismo@googlegroups.com

Kotizoj kaj kontoj:

Kotizo	eŭroj	
Normala	20.00	La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "tria-monda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.
Subtenanta	30.00	
Rabatita	10.00	

Bonvolu ĝiri vian **IKEL**-kotizon **ekskluzive** al la konto de **IKEL** ĉe **UEA** (kodo: **ikel-y**), **UNIVERSALA ESPERANTO-** (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- ABN-Amro Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99,
BIC/SWIFT: ABNANL2A).
Ĉiukaze indiku "**ikel-y**" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la **IKEL**-konto: **IKEL** absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!
- **Pago per PayPal konto** al Xabier Rico Iturriotz,
retpoŝto xabirico@outlook.com

Perantoj:

- **FRANCIO** eblas sendi ĉekojn al *Alain Favre*.
(Poŝtadreso ĉi-supre.)
- **NORVEGIO** oficejo@esperanto.no
- **KATALUNIO** Sandra Vives: sandra@esperanto.cat

Eblas reklami en *Etnismo*!

- **Anonctarifo:** (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Venonta redaktolimdato: 31an de oktobro 2020

Lingva revigligo: plej grava celo por etnistoj

Alain Favre

Oni ofte diras, ke el la proksimume 7 000 lingvoj de la mondo duono estos malaperinta fine de tiu ĉi jarcento. Tio ŝajnas al mi iom optimisma. Plejmulte tiuj lingvoj estas parolataj de kelkcent, kelkmil homoj, ili ne aŭ apenaŭ estas skribataj, facile ili malaperos preskaŭ senspure post kelkaj jardekoj. La kaŭzoj de tiuj malaperoj estas diversaj, de genocidoj – ili ja plu okazas, ekzemple en Amazonio, pri tio vi povos legi en tiu ĉi numero – ĝis “simplaj” malpermesoj, rifuzoj de serioza instruado, sociaj hontigoj, kiuj kondukas al ne-transdono al la postaj generacioj. La lingvo pli kaj pli malaperas el la publika vivo, eĉ el la privata, la geavoj gardas ĝin por si, tiom pli, ke ĝi ofte utilas kiel sekreta lingvo inter ili.

Por transvivi, lingvo ofte bezonas iom da publika subteno, sed ankaŭ oficialaj idiomoj povas esti minacataj; plurfoje ni traktis tiun fenomenon en Ruslando, kaj vi plu povos legi pri ĝi en tiu ĉi numero.

Ni pli mallonge aludos al la situacio en Irlando, kie la nacia lingvo, kompreneble tute oficiala, estas aparte mi-

nacata kaj ŝajnas nekapabla regajni la poziciojn perditajn dum la lastaj du jarcentoj.

Tiu perdo de propra lingvo por etno, por nacio, estas ofte sentata kiel profunda vundo fare de multaj popoloj. La identeco, la digno riskas same malaperi. Pro tio ĝermis la ideo tutsimple (re)paroli la antikvan, foje preskaŭ forgesitan lingvon. Plej konata ekzemplo estas tiu de la hebrea: tiu semida idiomu ne plu estis “socia” lingvo de preskaŭ 2 500 jaroj (fakte de post la deportado de la judoj al Babilono). Sed pro la senĉesa agado de *Eliezer ben-Jehuda*, ruslanda judo, kiu migris al Palestino en 1881 kaj dum 40 jaroj ade laboris pri la revigligo de la hebrea, tiu lingvo eken sociiĝis kaj nun estas la sola oficiala lingvo de Israelo, post la forĵeto de la araba en 1948. Tamen la hebrea neniam malaperis, ĝi daŭre estis uzata de verkistoj, kiuj plejofte traktis religiajn kaj filozofiajn temojn. Necesis do modernigi la terminologion. Iuj lingvaj revigligoj ekiras el multe pli malbona situacio. Mi memoras pri interesa prelego, kiu okazis dum la UK en Adelajdo en 1997: temis pri aborigena familio, loĝanta en tiu urbo, kiu deziris paroli la lingvon de la geavoj, pri kiu oni

sciis tre malmulte. Lingvistoj akceptis (re)konstrui tiun idiomon, poste parolatan de tre eta grupo. Sed tiu fenomeno disvastiĝis en Aŭstralio, kie multaj indiĝenoj decidis forlasi la markilojn de la koloniantoj kaj repreni la regadon de siaj lingvo, kulturo, arto kaj tero. Ĉiuj tiuj postuloj estas ja interligitaj, kio emas maltrankviligi la regantojn.

Krom tiuj facile imagblaj obstakloj eksteraj, ekzistas ankaŭ internaj kontraŭuloj. Foje ili estas la plej dangeraj. Maljunaj parolantoj ofte prestiĝaj kritikas la “novkreitan” lingvon, kiu laŭ ili ne plu estas “natura”. Antaŭ pluraj jardekoj, bretonaj geavoj plendis, ke iliaj nepoj lernas *brezhoneg chimik* (kemian bretonan), por ili nekompreneblan, kaj aldonis, ke estus pli bone, se la junuloj daŭre ĉion lernus en la franca! Iuj sciencistoj, ĉefe dialektologoj, subtenas tian opinion. Aparte frandante diferencojn inter vilaĝoj, ili neas la bezonon de ununura lingvo, eĉ se ĝi estus nur skribata. Ĉar ĝuste ili rekomendas “fonetikajn” skribmanierojn, por bone montri tiujn diferencojn. la sama teksto havus tiom da versioj, kiom da esploritaj lokoj. Kompreneble en eduka sistemo tio ne eblas, nek entute por publik-

igi librojn, gazetojn, malfermi retejojn... Aliflanke, kvankam oni ŝatus reveni al t.n. “mallongaj cirkvitoj”, vilaĝe bazita ekonomio ne plu ekzistas, la lingvo devas adaptiĝi al geografie pli vasta uzo.

Post la rekonstruo aŭ adaptado kaj instruado, la ensociiga procezo estas rapide necesa. Oni povas komenci per renkontiĝoj en publikaj lokoj, organizo de festivaloj, kie oni vere parolas la lingvon (do ne nuraj folkloraj), bazaj amaskomunikiloj... La nuna ekzisto de la reto, en landoj, kie ĝi estas libera, estas eksterordinara helpo. Kompreneble la lingvo devas iĝi iel moda, mojosa, kapabla trakti plej modernajn temojn. Tiukaze politikuloj komencas interesiĝi, municipoj emas dungi homojn, kiuj konas la minoritatan lingvon. Tiu ĉi tiam refariĝas videbla kaj aŭdebla, do ensocia.

En la grizona taggazeto *La Quotidiana* ĵurnalisto rakontis pri virino, kiu mendas germane en vendejo kaj samtempe insultas sian petoleman hundon en la romanĉa. Kiam ŝi mendos en la raeta idiomu kaj mistraktos la hundon germane, jam estos eta sed klara signo de revigligo por la loka lingvo. ■



MUNAL MEXIKURBO

“Voĉoj el la Tero”:

Meksika Nacia Belarta Muzeo ekspozicias lingvan diversecon

Pascal Dubourg-Glatigny

*La ekspozicio
Voces de la tierra:
lenguas indígenas,
estis vizitebla de
la 8.08.2019 ĝis
la 1.03.2020 ĉe
Museo Nacional
de Arte, Calle de
Tacuba 8, Ciudad
de México.*


Blanke pure brilanta, glimanta kiel sennuba ĉielo, T-forma tuniko akceptas la vizitantojn de nekutima ekspozicio ĉe la Nacia Belarta Muzeo de Meksikurbo (MUNAL). La nenombreblaj emajlitaj bakargilaj bulboj, el kiuj komponiĝas la skulptaĵo, aludas al la plumriĉaj vestaĵoj de la malnovaj popoloj de Mezameriko, la krucoformo pensigas pri la deviga kristanigo de la lando, kiu okazis rapide post la alveno de la hispanaj koloniistoj. Aŭtoro de la artaĵo estas la poldevena *Xawery Wolski* (naskiĝis en Varsovio en 1960), kiu jam delonge vivas en Meksiko kaj atestas pri ties

realaĵoj kunigante pasintecon kaj nuntempon.

Ne facilas ekspozicii lingvojn, kaj la celo fariĝas defio por belarta muzeo, kiu kutimas prilabori kaj montri vidajn objektojn. La Nacia Belarta Muzeo de Meksiko tamen ne rezignis ilustrati la historion de la enlandaj indiĝenaj lingvoj ekde la 16-a jarcento, kiam ilin ekkontaktis la dominanta hispana lingvo. Laŭ la oficiala katalogo de la Nacia Instituto por Indiĝenaj Lingvoj (INALI), en Meksiko estas nuntempe uzataj 68 lingvoj, kiuj grupiĝas en 11 diversaj lingvofamilioj kaj esprimiĝas en 364 variantoj. Kvankam la ŝtato ne posedas oficialan lingvon, uzo de la hispana estas necesa por aliri la juran sferon kaj la superan

edukadon, malgraŭ ke preskaŭ unu miliono da homoj ne posedas ĝin. 6 % de la meksikanoj parolas almenaŭ unu el la indiĝenaj lingvoj, ĉefe en la suda kaj orienta partoj de la lando (statistikoj laŭ memdeklaro). La plej uzataj estas la naŭatla (aztekdevena), kun preskaŭ du milionoj da parolantoj kaj la majaa, kun naŭcent mil parolantoj. Ilia situacio en la unuagrada lerneja instruado de iuj regionoj progresis en la lastaj jaroj, kaj nun la nombro de lernejoj, kie ne troviĝas instruanto scipovanta la lokan lingvon, reduktiĝis al nur 8 %¹.

1. H. V. Robles Vásquez, M. G. Pérez Miranda (red.), “Panorama educativo de la población indígena y afrodescendiente”, INEE, Mexico, 2018.



Ramon Cano Manilla (1888-1974), *Indianino el Oaxaca*, 1928, MUNAL, Meksikurbo.



Xawery Wolski, *Sen titolo*, 2017.

La ekspozicio komenciĝas per la frua koloniisma periodo, kiam kleraj misiistoj ekinteresiĝis pri la lingvoj, transskribis ilin al la latina alfabeto, ektradukis kaj klopodis redakti priskribojn, gramatikojn kaj vortarojn. Sed tiu enkonduka sekcio ankaŭ montras la valoron de la lingvo kiel posedaĵo de teritorio. Atestas tion la kodekso "Historio de *Txacala*", finredaktita en 1585, en la hispana kaj naŭatla, el kiuj unu kopio estis sendita al la hispana reĝo. Pere de riĉa sistemo de ilustraĵoj kaj priskriboj ĝi ilustras la kulturen kaj politikan evoluon de la popoloj en la regiono ĉirkaŭ Meksikurbo post la alveno de la Hispanoj. Ankaŭ la podologiaj mapoj de *Cuauhtinchan* (kopiitaj ĉirkaŭ 1900 de José Maria Velasco) montras, kiom la spacorilato de specifa homgrupo influas la lingvostrukturon.


Dividita laŭ regionaj sekcioj, la ekspozicio prezentas la specifecon de la unuopaj lingvo-fami-



Vido al la ekspozicio, muro de maskoj.

lioj per objektoj, kiuj malkovrigas la kulturen specifecon. La objektoj kreitaj de la diversaj grupoj distingiĝas en Meksiko per elaborita kolora kaj motiva sistemo, kiu rilatas al la nealfabetaj skrib-sistemoj de ties lingvoj. En ĉiu ĉambro la ekspozicio ne nur prezentas objektojn produktitajn de la popoloj sed ankaŭ montras,

kiel la ekstera rigardo konstruiĝis, ĉar la bezono klasifiki en grupoj kaj subgrupoj ofte venis de ekstere. Vojaĝantoj kaj antropologoj, plejparte eksterlandanoj kaj ĉefe eŭropanoj, dokumentis ekde la fino de la 19-a jarcento la ĉiutagan realecon de la diversaj homgrupoj. La laborista fotografo Walter Reuter, enmigrinta



Priskribo pri la naŭatla lingva mapo: El vikimedia. Fonto: INEGI (2005): *Perfil sociodemográfico de la población hablante de náhuatl*, p. 4: *Población de 5 años y más hablante de náhuatl por entidad federativa, [en el año] 2000. Kun aldonaj nombroj el la esperanto retejo.*



En ĉiu ĉambro la ekspozicio prezentas objektojn produktitajn de la popoloj.

Meksikon kiel politika rifuĝinto en 1942, abunde kontribuis per filmoj kaj foto-serioj pri la vivo de la indiĝenoj. Ankaŭ la nederlandano Bob Schalkwijk, kiu hejmas ekde 1958 en Meksikurbo kaj kies verko ampleksas preskaŭ

400 000 fotojn, regule interesiĝis pri izolitaj popoloj de la lando.

Sed la komprenon de la popoloj konstruas ankaŭ la rigardo de meksikaj artistoj de la 20-a jarcento, kiuj ĉiam pli ofte ĉerpas en la tradicia repertuaro inspirfontojn por novaj esprimrimedoj. Elstaras la verkoj de Francisco Toledo, kiu kapablis enbildigi la kosmovidon de la indiĝenaj popoloj, Rufino Tamayo, kiu partoprenis en la antaŭmilita tiel nomata "muralista movado" de imponaj narativaj murpentraĵoj, la tzotzila fotografino kaj verkistino Maruch Santíz, kaj Maricela Gómez, kiu renovigas la multkoloran terakotan tradicion. Ili kontribuas al la kohereco de la meksikaj bunteco kaj unueco.

La lasta sekcio de la ekspozicio estas dediĉita al la lingvo-rajto. En la printempo de 2019, kiam oni finpreparis la ekspozici-

cion, forpasis unu el la kvar lastaj parolantoj de la lingvo kiliŭa, en la meksika regiono de Suda Kalifornio. Pluraj lingvoj de la lando estas nun parolataj de malpli ol dek homoj, kaj preskaŭ du trionoj de la tuta meksika lingvaro riskas baldaŭn malaperon. Imponas muro, kolekto de maskoj, tradiciaj kaj nuntempaj: ĝi esprimas senvoĉajn vizaĝojn. Kvankam diversaj artistoj enkorpiĝas la kulturen specifecon en la nuntempa kulturon, tio ne savos la lingvojn. La arto ne kapablas konkurenci kun la politika kaj ekonomia forto de la asimilanta hispana lingvo, kiu posedas kreskantan tutmondan dimension. Tamen, kiel substrekas la kuratoroj de MUNAL, «rekono de ĉies popolo konservi sian memoron kaj decidi pri sia futuro donas al nia nacio ĝian identecon kaj fierigas nin». ■



La divido de Aŭstrio-Hungario (1919-1920):

La traktatoj de Saint-Germain kaj de Trianon

Guiu Sobiela-Caanitz¹
Esperantigita far Nicole Margot

Prologo

La aŭtoro de ĉi tiuj linioj, ekde sia infanaĝo fervora pri historio kaj pri geografio, senprobleme trapasis, en 1952 kaj 1953, la parolajn ekzamenojn de tiuj fakoj en la du partoj de la franca abiturienta ekzameno. Por la unua parto, okazis lotado pri geografio, kies programo inkludis Francion kaj ties koloniojn. Kaj kiujn koloniojn! Ili estis ĉie, kaj la tiamaj okazaĵoj devigis interesiĝi pri Vjetnamio, du jarojn antaŭ la fama malvenko de *Diên Bien Phu*, hodiaŭ certe forgesita. Mi lot-

prenis Ĝibution, teritorion same forgesatan. Koncerne historion oni pridemandis min en 1953; jam impresita de la tuteŭropa ideo, tiun punkton mi do aparte studis laŭ la kunteksto de la jaroj 1848 en la diversaj ĉefurboj de la kontinento... kaj havis la ĝojon esti petita esprimi min pri tio. Jarojn poste, laca de la franca koloniismo, mi elektis migri en Svislandon, landon sen kolonioj kaj plurlingvan, kiu donis al si federacian konstitucion jam en 1848. Belgio evoluis iom post iom en la saman direkton fine de la lasta jarcento. Francio, in-

verse, restis fidela al la napoleona centrismo kaj uzis la malvenkon de Aŭstrio-Hungario en 1918 por subteni tiujn, kiuj volis detru la tiel nomitan "malliber-
ejon de la popoloj". Ili ne vidis, ke tiu kvalifiko pli taŭgas al la lando, kies ministro pri publika klerigo en 1925 deklaris: «Por la lingva unueco de Francio la bretona lingvo devas malaperi.» La franca historiisto *Jean Bérenger*² (1934) majstre rehabilitis Aŭstrio-Hungaron: «La francoj remalkovris la eksterordinaran kontribuon de la patrujo de *Sigmund Freud* kaj de *Gustav Mahler* al la eŭropa kulturo (...). Centra Eŭropo diseriĝis fine de la Unua mondmilito (...). Neriparebla fuŝo far ŝtatestoj emaj puni la venkitojn de la tutmonda kon-

«En la najbaraj landoj de Hungario, ĉ. 2,5 milionoj da hungaroj plu parolas hungare kaj konsideras, ke ili apartenas al la hungara nacio, sed nek ili, nek la socio aŭ la politikistoj en Hungario revas modifi la nunajn limojn. Tamen ili insistas, por ke la hungaraj minoritatoj ricevu edukadon en sia gepatra lingvo kaj estu konsultataj pri la leĝoj kaj dekretoj, kiuj koncernas ilin»

1. En la numero 75 de *Etnismo* (15.12.2004), ni aperigis intervjuon de *Guiu Sobiela-Caanitz*, titolitan: «Kiel kataluno fariĝas instruisto de la romanĉa en liceo de Malalta Engadino». Plurfoje ni esperantigis artikolojn de *G. Sobiela*, aperintajn en la romanĉ-lingva gazeto *La Quotidiana*, por aperigi en *Etnismo-n*. Notindas, ke tiu ĉi nuna artikolo estis verkita por *Etnismo* en la franca, ĉar la aŭtoro ne regas Esperanton. (N.d.R.)



flikto (...). La aŭstra-hungara Imperio ja ne perfektis (...). [Ĝi] proponis akcepteblan solvon al la popoloj, kiuj ĝin konstituas [kaj kiuj povus ankoraŭ] sin federi libere»³. Jes, la nacioj, emancipitaj per la diserigo de Sovetunio kaj de Jugoslavio, povintus unuiĝi en reciproka respekto de siaj stabilaj landlimoj.

De 1867 al 1919

La aŭstra-hungara Imperio, aŭ simple Aŭstrio-Hungario, naskiĝis en 1867 el kompromiso inter la imperiestro Francisko Jozefo (1830-1916) kaj la hungara ŝtato, al kiu aldoniĝis Kroatio-Slavonio kaj Transilvanio. La artikolo "Österreichisch-Ungarische Monarchie" de la germana enciklopedio "Meyers Konversations-Lexikon" (5^a eld., Volumo 13, Lepsiko kaj Vieno 1897, p. 301) indikas la sekvajn statistikojn por Aŭstrio (A), Hungario (H) kaj la monarkio (M):

- Areo: A 300 113 km², H 325 324 km², M 625 337 km²;
- Loĝantaro 1880: A 22 144 244, H 15 739 375, M 37 883 619;
- Loĝantaro 1890: A 23 895 413, H 17 463 791, M 41 359 204.

La lernolibro de Jean Béren-ger² citas fundamentan normon de la aŭstra konstitucio de 1867: «Ĉiuj popolgrupoj (...) de la ŝtato estas egalrajtaj kaj ĉiu etna grupo senkonteste rajtas konservi kaj kultivi sian naciecon kaj sian lingvon. La egaleco de ĉiuj enlande kutimaj lingvoj (...) estas rekonita en la lernejoj, la administracio kaj la publika vivo.» (art. 19, p. 109)⁴. La lingvisto Hans Goebel (Universitato de Salzburgo) skribas: «La vario kaj la egaleco igis eldoni iom post iom la oficialan ĵurnalon de la imperio en la dek sekvaj lingvoj: (...) germana, (...) itala, (...) hungara, (...) ĉeĥa kun slovakaj, (...) pola, (...) ukraina, (...) slovena, (...) serba en cirila alfabeto, (...) serba kaj kroata en latina alfabeto, (...) rumana»³. En 1908, Aŭstrio-Hungario aneksis Bosnio-Hercegovinon kaj igis ĝin Reichsland (kunregajo) dotita de elektita parlamento, kio pligravigis la krizon de la rilatoj inter la monarkio kaj ĝiaj serbaj regnantoj, subtenitaj de la vasta rusia impe-

rio kaj de la serba reĝlando kun siaj 4 milionoj da loĝantoj. La loĝantoj de la monarkio kutimis paroli en 1914 la sekvajn lingvojn: la germana (25%), hungara (17%), ĉeĥa (13%), serbokroata (11%), pola (9%), ukraina (8%), rumana (7%), slovakaj (4%), slovena (3%), itala kaj ladina (2%), aliaj (1%).

La terorista sekreta socio, La Nigra Mano, gvidata de kolonelo el la serba armeo, rekrutis junajn serbojn de Bosnio, kiuj murdis en Sarajevo la heredan princon de Aŭstrio-Hungario kaj lian edzinon (28an de junio 1914). La 23an de julio Vieno sendis al Beogrado provokan ultimaton, al kiu Serbio povis nur respondi same: ĝi mobilizis, kaj Vieno faris same. De tio rezultis aŭguste milito de la du germanlingvaj imperioj kontraŭ la tri aliancaj potencoj flanke de Serbio, al kiuj unuiĝis poste aliaj ŝtatoj. La fino de Aŭstrio-Hungario venis per unu sola bato, tre rapide. La 17an de oktobro 1918, la juna imperiestro kaj reĝo Karlo (1887-1922) anoncis la transformon de la monarkio en federacion de naciaj ŝtatoj; ĉi tiuj estis proklamitaj tagdekon poste, kaj Karlo mem, kiel reĝo de Hungario, konfidis la formadon de sia registaro, la 30an de oktobro, al la grafo Mihály Károlyi (1875-1955). Post kio la imperiestro ekzilis sin al la insulo Madejro kaj mortis tie.

La 29an de aprilo 1918, en Ukrainio, okupita de Germanio kaj Aŭstrio-Hungario, naskiĝis efemera ukraina ŝtato, kiu estis fine dividita inter soveta Rusio kaj Pollando.

La 7an de oktobro 1918, la pola ekzekutiva konsilantaro en Varsovio, ankoraŭ sub la germana



2. Jean Béren-ger, *L'Empire austro-hongrois*, Dua eldono. Paris, Armand Colin, 2011, ISBN 978-2-200-2488-8, p. 109.

3. El: Helmut Glück kaj alii (ed.), *Schriften der Matthias-Kramer-Gesellschaft zur Erforschung der Geschichte des Fremdsprachenerwerbs und der Mehrsprachigkeit*, vol. 2. Bamberg, Univ. Otto Friedrich, 2018, pp. 43-84.

4. La origina germana teksto: «Alle Volksstämme des Staates sind gleichberechtigt, und jeder Volksstamm hat ein unverletzliches Recht auf Wahrung und Pflege seiner Nationalität und Sprache. Die Gleichberechtigung aller landesüblichen Sprachen in Schule, Amt und öffentlichem Leben wird vom Staate anerkannt.»

okupado, proklamis “sendependan unuiĝintan Pollandon”.

La 28an de oktobro 1918, Aleksandro Karadjordjević (1888-1934), regenta princo de Serbio, proklamis en Beogrado la reĝlandon de la serboj, kroatoj kaj slovenoj, kiu ricevis aŭstran Dalmation, krom la urbo Zara (hodiaŭ *Zadar*) atribuita al Italio.

La saman tagon en Prago la Ĉeĥa Nacia Komitato proklamis Ĉeĥoslovakian Respublikon, al kiuj la venkintoj atribuis poste vastajn germanlingvajn teritoriojn, ĉefe la patrujojn de la Sudetaj germanoj, same kiel Slovakion, Rutenion kaj regionojn loĝatajn de hungaroj.

La geografo Aldo Dami (1898-1977), docento, poste instruisto en la Ĝeneva Universitato de 1958 ĝis 1968, publikigis atlason pri la eŭropaj limoj dum la lasta jarcento⁵. Dami komentis la teritoriajn kondiĉojn de la traktatoj de *Saint-Germain-en-Laye* (10an de septembro 1919) kaj *Trianon* (4an de junio 1920), verajn diktatojn truditajn de la venkintoj al Aŭstrio kaj Hungario. En Karintio (*Kärnten/Koroska*), la plebiscito de la 10a de oktobro 1920 lasis en Aŭstrio la tutan dulingvan teritorion kontestitan, sed ĝi devis cedi al Italio la regionon de Tarvisio/*Tarvis*. La venkintoj, kaj ĉefe la prezidento de Usono, Woodrow Wilson (1856-1924), lasis sin trompi de la geografiaj mapoj falsitaj de itala naciisma propagando; ĉi tiu italisigis ĉiujn toponimojn germanlingvajn de la regiono nomata hodiaŭ Sudtirolo, ekzemple *Vetta de Italia* por *Dreiherrenspitze* aŭ *Monguelfo* por *Welsberg*. Italio ricevis same Trieston kaj tutan Istrion kun gravaj kroataj kaj slovenaj malplimultoj. Rumanio ricevis la teritorion de eks-Bukovino aŭstra kun ties loĝantaro germanlingva



(21 %), rumana (32%) kaj ukraina (42 %). La venkintoj de 1918 desegnis la limojn de la juna germana Respubliko de Aŭstrio, al kiu ili formale malpermesis aliĝi al la Germana Respubliko de Weimar. Tion postulis la traktato de *Saint-Germain-en-Laye*, kiun devis subskribi, la 10an de septembro 1919, la aŭstria kanceliero Karl Renner (1870-1950). Tiuj landlimoj estis konfirmitaj la 15an de majo 1955 de la venkintoj en 1945: dume oni estis forpelinta milionojn da germanoj el Sudetio.

Cent jarojn post Trianono

La nunaj Aŭstrio kaj Italio ambaŭ apartenas al Eŭropa Unio (EU), kio faciligas la rilatojn inter la unua kaj la germanlingvaj komunumoj aneksitaj de Italio en 1919. Male la malplimultoj disigitaj de Hungario en 1920 plurfoje ŝanĝis politikan apartenon. La hungaroj restintaj en sia ŝtato nomata *Magyarország* sentis sin ekde tiam senigitaj de grava parto de sia komunumo, de kiu oni ilin brutale disigis. Ni ekzemplu per minoritatano el Bratislavo/*Pozsony* en la hungara, el *Osijek/Eszék* en Kroatio, el *Eisenstadt/Kismarton* en Aŭstrio, el *Subotica/Sza-*

badka en Serbio, el *Timișoara/Temesvár* en Rumanio aŭ el *Ujhorodo/Ungvár* en Ukrainio; la unua de ĉiu paro de toponimoj estas hodiaŭ la oficiala, sed la dua estas tiu en la minoritata hungara lingvo. Kiel en tiuj urboj tiuj hungaroj povas vivi uzante sian lingvon? Ĉiu el tiuj ŝtatoj, krom Ukrainio, apartenas al EU same kiel Hungario, sed ilia konekzisto kun tiu lasta estas for de perfekto.

La hungarojn disigas de la najbaraj lingvoj limo nevidebla, sed reala: ili frontas ĉie hindeŭropajn lingvojn. La plej multaj estas slavaj, do tre proksimaj unu al la aliaj, sed necesas aldoni la latinan, kies parolan uzon multaj kleraj eŭropanoj de la pasintaj jarcentoj kultivis, kaj la rumanan, latinidan lingvon de Rumanio. Oni konas la ritan aklamon prononcitan la 25an de junio 1741 de la hungaraj nobeloj en la katedralo Sankta Marteno de *Pozsony* dum la kronado de *Maria-Teresia*: «*Vivat domina et rex [sic!] noster Maria-Theresia!*» La Hungara Reĝlando, kutimiĝinta al viraj reĝoj, rekonis tiam kiel “reĝon” la filinon kaj heredantinon de ilia antaŭa monarko, la imperiestro Karolo, la 6a (1685-1740); la tutlasta, alia Karolo mortis, kiel ni vidis, en Madejro en 1922.

La Trianona Traktato estis subskribita en Versajlo (Franci-

La Trianona Traktato estis subskribita en Versajlo (Francilio) en la kastelo Granda Trianono. La venkintoj de 1918 altrudis al Hungario, reĝlando sen reĝo nek reĝino, regata de regento, la landlimojn, kiuj devis disigi ĝin de la pligrandigita Rumanio, de Ĉeĥoslovakio kaj de la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj (SHS), renomita Reĝlando Jugoslavio ekde 1929 – Jaron poste la landlimo estis fiksita ankaŭ kun Aŭstrio, kiu gajne ricevis Burgenlandon.

5. Aldo Dami, *Les frontières européennes de 1900 à 1975. Histoire territoriale de l'Europe*. Atlas. Genève (Médecine et Hygiène), 1976.



La hungara historiisto Géza Jeszenszky skribis en *Neue Zürcher Zeitung* de la 26a de septembro 2018: «En la najbaraj landoj de Hungario, ĉ. 2,5 milionoj da hungaroj plu parolas hungare kaj konsideras, ke ili apartenas al la hungara nacio, sed nek ili, nek la socio aŭ la politikistoj en Hungario revas modifi la nunajn limojn. Tamen ili insistas, por ke la hungaraj minoritatoj ricevu edukadon en sia gepatra lingvo kaj estu konsultataj pri la leĝoj kaj dekretoj, kiuj koncernas ilin».

lio) en la kastelo Granda Trianono. La venkintoj de 1918 altrudis al Hungario, reĝlando sen reĝo nek reĝino, regata de regento, la landlimojn, kiuj devis disigi ĝin de la pligrandigita Rumanio, de Ĉeĥoslovakio kaj de la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj (SHS), renomita Reĝlando Jugoslavio ekde 1929. Jaron poste la landlimo estis fiksita ankaŭ kun Aŭstrio, kiu gajne ricevis Burgenlandon. Ĉirkaŭ dek milionoj da hungaroj vivis tiam en Centra Eŭropo; 3,4 milionoj el ili kontraŭ sia volo estis atribuitaj «al Rumanio (1,662 milionoj), al Ĉeĥoslovakio (762 000), al la Reĝlando de la SHS (468 000) kaj al Aŭstrio (27 000)»⁶. Detalo de la geografiaj kondiĉoj en la traktato montras, ke iuj disigoj estis pravigitaj: ekzemple, en Transilvanio, la rumana plimulto de la regiono ekzistis apud gravaj hungaraj minoritatoj (p. 178). Sed la fortaj hungaraj protestoj celis malpli tiun aŭ alian detalon, ol la amason da maljustaĵoj koncerne tutan Hungarion. Kion hodiaŭ pensas pri tio la ĉirkaŭ dek milionoj da hungaroj vivantaj en tiu lando? La hungara historiisto Géza Jeszenszky skribis en *Neue Zürcher Zeitung* de la 26a de septembro 2018: «En la najbaraj landoj de Hungario, ĉ. 2,5 milionoj da hungaroj plu parolas hungare kaj konsideras, ke ili apartenas al la hungara nacio, sed nek ili, nek la socio aŭ la politikistoj en Hungario revas modifi la nunajn limojn. Tamen ili insistas, por ke la hungaraj minoritatoj ricevu edukadon en sia gepatra lingvo kaj estu konsultataj pri la leĝoj kaj dekretoj, kiuj koncernas ilin»⁶.

6. Arnold Suppan, *The Imperialist Peace Order in Central Europe / Saint-Germain and Trianon 1919-1920*. Österreichische Akademie der Wissenschaften / Austrian Academy of Science. Wien/Vienna 2019. ISBN 978-3-7001-8363, p. 156.

7. Arnold Suppan (vidu noton 6), p. 158.

Kien iras Hungario?

La loĝantaro de Hungario regule malkreskas ekde jardekoj; ĝi nuntempe estas sub dek milionoj. Por kompensi tiun demografian deficiton, la registaro subtenas la hungarajn komunumojn liveritajn al la najbaraj landoj per la Traktato de Trianono, ĉefe favoronante la hungaran civitanekon al ties ŝtatanoj konservintaj la uzon de la lingvo. Hungario, membro de EU, havas limojn kun kvin aliaj membroŝtatoj, entenantaj hungarajn malplimultojn disigitajn de Hungario far la Trianona Traktato.

- La ĉefa hungara komunumo ekster Hungario (1 227 623 personoj) estas tiu de Rumanio, pli ol 6% de la loĝantaro de tiu ŝtato. Du distriktoj de la rumana Karpatoj havas eĉ hungaran plimulton: *Kovászna/Covasna* (72,92 %) kaj *Hargita/Harghita* (84,6 %). Hungario kaj Rumanio havas 445-kilometran komunan limon; ĉe la rumana flanko de tiu limo troviĝas alia hungara diasporo kun la urbetoj *Arad/Arad*, *Oradea/Nagyvárad*, *Carei/Nagykároly* kaj *Satu Mare/Szatmárnémeti* (rumana nomo/hungara nomo).
- La dua hungara komunumo ekster Hungario estas tiu de Slovakio (520 528 personoj, 8,3 % de la loĝantaro de tiu ŝtato), kiu entenas loĝantaron de ĉirkaŭ 5,4 milionoj. La du ŝtatojn disigas limo longa je 515 km, kiu parte sekvas la fluon de Danubo.
- Serbio entenas loĝantaron de ĉirkaŭ 7 milionoj, el kiuj 3,5 % da hungaroj, precipe en la aŭtonoma regiono *Vojvodina/Vajdaság* (ĉefurbo *Novi Sad/Újvidék*) norde de Danubo. La komuna landlimo inter Hungario kaj Serbio longas je 151 km.
- La hungara malplimulto de Aŭstrio, en Burgenlando, entenas 40 533 membrojn. Landlimo 366 km-ojn longa disigas la du ŝtatojn kaj trairas la lagon *Neusiedler See/Fertő*.
- Kroatio estas disigita de Hungario per limo 163 km-ojn longa, kiu respondas grandparte al la fluo de Dravo, alfluanto je la dekstra bordo de Danubo. En 2001, restis nur 16 595 hungaroj en Kroatio, precipe en la regiono de *Osijek/Eszék*.
- Slovenio, kun loĝantaro de 2 090 000, el kiu 0,3 % de hungaroj, estas disigita de Hungario per limo de 102 km.

Jen do sep ŝtatoj, kies ses (krom Serbio) membras en EU, entenantaj ĉiuj la hungaran kaj aliajn lingvojn. Sufiĉas al ĉiu lando minimumo da eŭropa solidareco por plifortigi iun plurilingvismon, originantan de la reĝo Karolo la 3a, bazita sur reciprokeco kaj etendiĝanta de Adriatiko ĝis la Danuba Delto. Ekzistas krome hungara malplimulto en la ukraina regiono Rute-

nio, situanta sude de Karpatoj kaj do ekstera al EU. Ĝia ĉefurbo nomiĝas *Ujhorod* en la ukraina kaj *Ungvár* en la hungara. Sed Ukrainio kaj EU devus ankorau pli proksimiĝi unu de la alia. Ni esperu, ke la venonta fino de la pandemio ebligas antaŭeniri koncerne tion. Kiu scias ĉu la egaleco de ĉiuj ĉi popoloj, fronte al la plago, malfermos iliajn okulojn al ilia komuna tutplaneda destino? ■



Mongolio restarigos sian tradician alfabeton en 2025

Ferriol Macip

Esperantigita far Alain Favre

Komenciĝas transira kaj adapta periodo por forlasi la cirilan alfabeton, same kiel la rusismojn de la soveta epoko, kaj reiri al la tradicia vertikala skribmaniero.

Mongolio anoncis, ke la lingvo de la lando retrovos sian tradician alfabeton en 2025, forlasante la uzon de la cirila alfabeto trudita dum la soveta epoko. Por tion fari,

estis anoncita “komprenebla restarigo”, tio estas transiraj disponoj en difinita tempo. Tion sciigis la Ministerio pri Edukado, Kulturo, Scienco kaj Sporto.

Tiucele la ministerio ordonis, ke la Departemento pri Informado kaj Teknologio adaptu la tradician alfabeton, vertikale skribitan, al la “elektronika medio”. Plie, la ŝtataj oficoj pretiĝas por establi sistemon de mongolaj vortoj en la sciencaj kaj

beletraj fakoj por anstataŭigi la freŝdatajn rusismojn. La amasinformiloj publikigos en ambaŭ alfabetoj ĝis la fino de 2024, kaj la lernejoj havos tiun tutan tempon por instrui la tradician vertikalan skribmanieron de la mongola lingvo. Siaflanke la klerigaj centroj studos kaj disvastigos la kulturen heredaĵon skribitan en la mongola.

La mongola lingvo adoptis la cirilan alfabeton dum la 1940-aj jaroj. En tiu epoko

la lando estis konata kiel la “16a soveta respubliko”, ĉar, kvankam sendependa, ĝi ricevis fortan influon de Sovetunio, kiu uzis ĝin kiel landliman kusenon kun Ĉinio.

Aldone al la tri milionoj da mongolaj civitanoj, kiuj skribas en la cirila alfabeto, la preskaŭ ses milionoj da mongoloj el la tiel nomata Interna Mongolio, kiu estas parto de la Popola Respubliko de Ĉinio, plu uzas la tradician alfabeton. ■

Koncize el...

Alain Favre

🔊 **Irlando: Gaeltacht pli kaj pli minacata.** Ekde sia kreiĝo en 1922 la respubliko de Irlando decidis favori sian propran lingvon, tio estas la irlandan (ofte nomatan gaela, sed tiu nomo validas ankaŭ por la kelt-skota, ja tre parenca). Tiu lingvo estas la “unua oficiala”, pro tio ĝi estas agnoskita de Eŭropa Unio. Sed jam en la epoko de sendependiĝo, la angla ege superregis. Denaskaj irlandparolantoj ekzistas dis ĉie en la respubliko, sed ili koncentriĝas nur en diversaj areoj de la okcidenta parto, de nordo ĝis sudo. Tiuj lokoj konsistigas la tiel nomatan *Gaeltacht* (“irlandparolantaro”, termino, kiu plivastiĝis al “irlandparolejo”), oficiale difinitan dum la 1950jaroj, kie municipoj povas mem elekti sian lingvopolitikon. Ekzemple en lernejoj oni prioritare instruas en la irlanda. Vojindikiloj, ŝildoj, multaj dokumentoj estas (ankaŭ) en la loka lingvo. Sed tio ne malebligis, ke la uzo de la irlanda videble kaj aŭdeble regredis dum la lastaj jardekoj. Nun irlandlingvanoj konsistigas minoritaton en multaj lokoj de la *Gaeltacht* mem, pro socia premo de anglalingvanoj, kiuj daŭre alvenas, kaj pro malmulta helpo de la registaro al la disvolviĝo de la fore okcidenta parto de la Insulo. Prezentita aprile en la dokumenta filmo *Gaeltacht 2020* sur irlandia televidkanalo, la situa-

cio ŝajnas vere maltrankviliga. Sed iuj asocioj bone rezistas kaj inventas interesajn strategiojn kompreninte, post cent jaroj da nesukcesoj, ke ili devas agi sen la “apogo” de Dublino.

El Le Peuple breton kaj diversaj irlandaj retejoj

🔊 **Alĝerio: provoj diskrediti Hirak uzante kontraŭkabilan strategion.** De februaro 2019 Alĝerio estas skuata de *Hirak*, “la Movado”, kiu protestas kontraŭ la koruptitaj kaj predemaj registaroj daŭre regantaj la landon de 65 jaroj. Spite kelkajn sukcesojn, la batalo ne finiĝis kaj post la kronvira epizodo eĉ ŝajnas restarti. Tial subtenantoj de la registaro agas nun en la sociaj retoj por konvinki la popolon, ke *Hirak* estas movado fakte regata de kabiloj (amazigoj), kiuj volas detrui la alĝerian ŝtaton. Tiuj troloj difinas la kabilojn “francidoj”, “vandaloj” (kiuj volas nuligi la arabecon de Alĝerio – tamen vandaloj alvenis antaŭ araboj!), kaj ĉefe “zuavoj” (iamaj francaj soldatoj en Nord-Afriko)... Tiuj kaŝitaj aktivuloj emas forgesigi, ke kabiloj amase partoprenis en la liberiga milito kontraŭ Francio, kaj tio des pli facilas, ĉar la instruado de historio en Alĝerio estas same partianeca kiel ĉe aliaj diktaturoj. Post iomete da malfer-

mo al la amaziga kulturo antaŭ kelkaj jaroj, interalie tra nova konstitucio, la alĝeria registaro tendencas denove sekvi duran linion. Sed ĝi mem troviĝas en delikata situacio, kaj tiuj groteskaj manovroj povas nur danĝere akriigi intercivitajn konfliktojn.

El Global Voices kaj aliaj fontoj

🔊 **Nov-Kaledonio: dua referendumo pri sendependeco organizota ĉi-oktobre.** Unua referendumo okazis pri tiu temo novembre de 2018, kaj 56,7 % de la voĉdonantoj elektis plurestadon en la kadro de la franca ŝtato. Du el la tri provincoj favoris sendependon, sed tiu de la ĉefurbo Numeo, kie kanakoj (melaneziaj indiĝenoj) malpli nombras, sufiĉe pezis por kontraŭi tiun tendencon (vidu *Etnismo* 102). Necesis peto de minimume triono de la membroj de la nova kongreso por organizi duan voĉdonadon, kaj, post iom da prokrasto pro la pandemio, tiu okazos la 4an de la venonta oktobro. Ekzakte kiel lastfoje, jam okazas manipulado pri voĉdonintencoj; intertempe la sendependistoj iom plifortiĝis en la kongreso, tamen ne atingante plimulton. La situacio ne estas aparte klara; iuj “lojalistoj” nekanakdevenaj povus fariĝi sendependistoj, kalkulante pri la sufiĉe forta ekonomio de la insularo (ĉefe pro minejoj kaj marfundaj ekspluat-perspektivoj), dum iuj indiĝenoj povus deziri pli da socia helpo flanke de Francio en la nuna kriza periodo. Oni bedaŭrinde povas imagi sendependecon sen vera gajno por la kulturo kaj vivmaniero de la kanakoj, sed kun forta influo de eksterlandaj kompanioj, eĉ ĉirkaŭpacifikaj ŝtatoj, kiuj facile glutus la etan insularon, farante el ĝi unu el tiuj marionetaj landoj, kiuj abundas en la plej granda oceano. Tamen, eĉ se Nov-Kaledonio riskas neniam iĝi vera Kanakio, ni ne forgesu, ke ĉiu popolo rajtas pri memdecido.

El diversaj fontoj

Forpasis Hillary Chapman

Nia membro *Hillary (Bill) Chapman* el Kimrio mortis pro COVID19 la 20an de majo. Naskita en 1950, li esperantiĝis en 1967, estis interalie instruisto kaj urbestro de *Conwy* (apudmara urbo de Kimrio), ankaŭ ĉefdelegito de UEA por Britio. Ni povis renkonti lin dum diversaj UK kaj li foje verkis por *Etnismo*, eĉ antaŭnelonge. Li ĵus

aperigis *The Early History of Esperanto in the United Kingdom* (2019).

Etnismo kondolencas al la familio kaj ankaŭ al la kimraj kaj britaj esperantistoj, kiuj perdis aparte kleran, socieman kaj simpatian homon.

(pluraj informoj estas ĉerpitaj el La Ondo de Esperanto)



IKEL-informilo n-ro 83

Neokazontaj sed plu planataj kongresoj

Same kiel plej multaj grandaj (kaj malpli grandaj) eventoj en la mondo, la UK en Montrealo estis nuligita. IKEL intencis partopreni interalie en renkontiĝo kun indianaj nacioj de Kanado. Espereble tio povos okazi post du jaroj. Venontjare – se ne okazos nova kataklismo – ni estos en Belfasto. Jam anoncu vin se vi deziras ion prezenti pri la (nord)irlanda situacio, la keltaj kulturoj aŭ rilataj temoj. /AF



Nova kunredaktisto de *Etnismo*

Ekde ĉi tiu numero nia delonga redaktistino *Nicole Margot* kunlaboras kun *Ferriol Macip i Bonet*, konata kataluna ĵurnalisto kaj grafikisto, kiu interalie redaktas ĉiutage la okcitanan retgazeton *Jornalet* (kun foje papera eldono). Vi do tuj povis vidi diferencojn kun la antaŭaj numeroj de *Etnismo*. La komitato dankas al tiu sperta homo, kiu akceptis kunlabori al plibonigo de nia gazeto. Ni profitas la okazon por peti de vi artikolojn, eĉ simplajn novaĵojn, preferinde en esperanto por plifaciligi nian laboron.

Entute ni dankas pro via subteno kaj kalkulas je via daŭra kontribuo; multaj paperaĵaj gazetoj malaperas, en la esperanta mondo same kiel aliloke, kaj ni faras nian eblon por daŭre prezenti konkretan legaĵon. / AF

NICOLA MARGOT

Pri fejsbuka grupo

Ekde tiu ĉi jaro **IKEL** ekzistas sur Fejsbuko dank'al *Aleksandr Blinov*. En ĝi aperas regulaj kaj valoraj informoj. Ni lasu *Aleksandr* informi nin: «La 31-an de januaro 2020 estis kreita grupo de **IKEL** en Fejsbuko. En junio la membraro atingis 120 personojn kaj oni tie traktas kelkajn aktualajn temojn ligitajn al etnaj kaj lingvaj problemoj dise en la mondo. Jen la fejsbuka adreso: <https://www.facebook.com/groups/ikeleo/about>. Samtempe aperis ankaŭ **IKEL**-kanalo ĉe *Telegram*: <https://t.me/ikeleo>, kiu por la momento estas iom malpli aktiva kun iom pli ol 30 abonantoj.» / NM



KAROLINA GRABOWSKA

Intervjuo kun lingva aktivulo Vasilij Ĥaritonov

Aleksandr Blinov
Alparuh Pelem (en la ĉuvaŝa)

Rusio havas grandan teritorion kaj relative grandan kvanton da minoritaraj lingvoj. Hodiaŭ mi intervjuas unu el la lingvaj aktivuloj, *Vasilij Ĥaritonov*, kiu estas etne ruso sed kapantaŭe plonĝis en la problemojn de etnaj minoritatoj en Rusio. Nun li laboras kiel vicdirektoro de la scienca-kleriga centro "Humanitara urbanistiko" ĉe la Novgoroda Ŝtata Universitato, en la projekto pri dokumentado de la mansa lingvo kaj volontule kiel kungvidanto (kaj kunorganizanto) de la projekto "*Strana jazikov*" (Lando de lingvoj).

1. La **mansa lingvo** (aŭ pli frue ankaŭ vogula) apartenas al la ugra branĉo de la finn-ugra lingvaro (kaj tiel al la urala lingvaro) kaj estas do aglutina. Ĝi estas parolata ĉefe en *Ĥanti-Mansa*, aŭtonoma distrikto - *Jugra*. En 1989 vivis 8500 mantoj, el kiuj 37% parolis la mansan lingvon. Ĝiaj plej proksimaj parencoj estas la ĥanta lingvo kaj la hungara lingvo. La hungara kaj la mansa lingvo disbranĉiĝis en ĉirkaŭ 500 a. K. (NdR el eo-Vikipedio)

1. Vasilij, vi gvidas la projekton aŭ komunumon, kiu nomiĝas "Lando de lingvoj", ĉu vi bonvolus diri, kio estas la senco de tiu ĉi iniciato?

Ni ne havas klare formulitajn celojn, metodojn, ni simple ŝatas la lingvojn de Rusio kaj provas entrepreni diversajn aferojn, kiuj plej plaĉas al ni. Provizore mi ĝin formulis tiel ĉi: "tereno por interŝanĝo de spertoj, ideoj kaj energioj inter lingvaj aktivuloj", ĉar al iu necesas doni konsilon, la alian – laŭdi kaj simple aŭskulti. Ni kreskas kaj provas reagi al leĝdonaj aktoj, prezenti nin kun ekspertaj raportoj kaj artikoloj, ĉie kie tio eblas: rakonti al interesita junularo pri modernaj metodoj por revivigi lingvojn, helpi lanĉi lernogrupon en sociaj retoj, diskonigi bonan iniciaton aŭ prezenti nin antaŭ ŝtataj funkciuloj, kaj krom tio okazas regula komunikado en multegaj diskutgrupoj – tio ĉi estas "Lando de lingvoj".

2. Ĉu ne jam sufiĉas institucioj, strukturoj, sociaj organizoj, kiuj okupiĝas pri tiu ĉi problemaro?

Do, kiuj strukturoj? Estas ŝtatoficistoj kiuj ŝajne okupiĝas pri tiu ĉi problemaro, sed la fakto ke ni ekzistas – verŝajne estas la reago al tio ke estas tiaj oficistoj. Foje mi iris al du seminarioj de FADN (Federacia Agentejo pri Etnaj Aferoj) kaj mi komprenis ke se ne mi mem ion faru, tio estos la vojo al nenio. Eĉ la plej bonaj ŝtatoficistoj penas simpligi ajnan temon, kaj tuj sentebles kiel ŝtatoficistoj traktas la lingvojn de Rusio. Lernolibroj estas problemoj! Instruistoj – problemoj! Dialektoj – problemoj! Do multe pli simple ne rimarki ilin aŭ foje kunokazigi publikajn aranĝojn (la ŝtatoficistoj ĝuste en tio vidas LA laboron).

Krom tio restas ankoraŭ instruistoj, al kiuj malfacilas helpi: ili dum deko da jaroj estis en

malfacila situacio pro malmultaj klasoj, pro malmultaj instru-horoj, en medio, kie jam la lingva anstataŭo okazis, kaj pro manko de, kaj nescio pri modernaj metodoj por instrui al ruslingvaj infanoj. Aparta temo pri neregistaraj organizoj. Ili aŭ dancas laŭ la fifro de ŝtatoficistoj aŭ male disfalas kaj fermiĝas pro nepovo realigi siajn proprajn intencojn.

Tial ni decidis uzi analizan mezureblan aliron (sen tro sciencumi kompreneble, kvankam inter ni estas pluraj junaj sciencistoj) kaj akceptis la ideon, ke por ni plej gravas evoluigo kaj popularigo de la lingvoj de Rusio, la multlingveco, kaj ni pretas lerni ajnan sperton kaj interdividi ĝin.

3. Ĉu vi povus diri kelkajn vortojn pri ĝi kaj rakonti, kio jam estas farita?

Verdire unue mi ekokupiĝis pri la jukagira lingvo ² kaj pere de ĝi mi entute mergiĝis en la kampon de lingvoj de Rusio. Kaj mi komprenis, ke okupiĝi distance estas malefike, sed atingi la lokon, kie oni parolas la jukagiran estis malfacilege (la norda parto de Jakutio, helikopteroj kaj specialaj ĵipoj, kaj por mi tio estis volonta agado). Tial mi decidis elekti lingvon, kiu unuflanke estu pli proksima, pli alirebla kaj aliflanke – pri kiu mankas aktivuloj. Pri finno-ugraj kaj pri tjurkaj lingvoj estas multaj aktivuloj, dum pri tunguzaj ³ lingvoj preskaŭ ne, kaj ili estas mortontaj. La evena ⁴ kaj la evenka ⁵ estas tro dislokitaj, dum la nanaja (malnova nomo:

golda) ⁶, la tria laŭ la nombro de parolantoj (300), estas la plej taŭga.

Nuntempe mia agado daŭre restas ĉefe distanca, kaj tio certe estas problemo. Ekzemple mi scias, ke la homoj tre diverse uzas sociajn retojn, kaj la kamparanoj tre ofte tute ne scipovas uzi ilin krom por iom babili. Tamen ni havas iom da rezultoj – mi trovis kelkajn samideanojn, en kelkaj vilaĝoj aktiviĝas homoj kaj tiam mi pretas ilin helpi ĉiel. Mi povas listigi la atingojn de la lastaj jaroj:

- en unu vilaĝo oni provas uzi la nanajan en la publikaj sferoj (ĝis nun ĝi estis uzata nur hejme, en fiŝkaptado kaj en kontakto kun lingvistoj);
- relative multaj familioj estas pretaj fordoni siajn infanojn en la sistemojn de “lingvaj nestoj”;
- okazis deko da eventoj pri la nanaja lingvo (kion mi konsideras malefika maniero sed bela por diversaj raportoj).

Antaŭ duonjaro oni invitis min partopreni en la mansa projekto, kaj nun por mi ĝi fariĝis fakte laboro. Kaj tial ke mi havas rimedojn por ekspedicioj (verdire ili estas sciencaj sed ĉiukaze mi trovas eblojn ankaŭ aktivumi). Kaj jam videblas la rezultoj: ni filmis animaciaĵon, faris artikolon kun fakte la unusolaj infanoj, kiuj parolas la mansan lingvon. Por ili tio estis mirinda, sed ni mem observis kiel eĉ unuopaj paŝoj

por disvastigo de la lingvo influas ilian rilaton al la propra lingvo. Kaj kiam la animacia filmo, kiu estis farita dum kelkaj vesperoj, atingis pli ol 2 mil vidojn, ni konsideris tion kiel tre bonan venkon por adolekskuloj.

Fine persone por mi estas ankaŭ la burjata agado. Mi preskaŭ ne konas la lingvon, sed konas apartajn aktivulojn kaj provas kun ili fari diversajn utilajn agadojn. Kaj post tiuj miaj “malgrandaj” lingvoj – la burjata estas konsiderata kiel vere multe uzata lingvo, ĉar estas multaj, kiuj vere parolas ĝin. Kaj se kunlaboranto pri la nanaja aŭ la mansa estis malsana, la tuta laboro bremsiĝis foje por monatoj (kaj oni perdis entuziasmon), dum pri la burjata foje sufiĉis helpi vidigi la direkton de la agado kaj okazas mirakloj.

4. Kiujn malfacilaĵojn spertas la lingvoj kaj la kulturoj de Rusio? Kaj kiel oni povas helpi?

Malfacilaĵoj abundas, kaj mi provu rakonti pri kelkaj: – historie formiĝis (sed necesas diri ke tio estis ne ĉiam), ke en Rusio estas tre forta sinteno favore al unulingvismo. Se mi diras pri la ideo disvolvi ekz. la tataran ⁷ kaj la udmurtan ⁸ lingvojn, mi tre ofte aŭdas nomi min “rusofobo”. Mi estas ruso kaj ŝatas la rusan, nia filino frekventas kurson de novgoroda folkloro, krom tio mi ludas akordionon. Kaj mi imagas, kiom multe oni devas aŭdi pri siaj lingvo, etno, akĉento. Mi imagas,

2. La **jukagiraj lingvoj** (ankaŭ nomataj jukagi-ro-ĉuvanaĵoj aŭ odulaĵoj en Rusio) estas familio de lingvoj parolataj en Rusio inter la jukagi-roj, Siberia popolo, kiu loĝas ĉe la baseno de la rivero *Kolima*. (NdR el eo-Vikipedio)

3. **Al tunguz-mancura lingvaro** apartenas kelkaj lingvoj de Okcidenta Siberio, Mongolio kaj Manĉurio. Laŭ la lingvisto *Valentin Avrorin* ili estu dividitaj je tri grupoj: La nord-tunguzaj, evonkaj: evena (norde de Siberio

kaj norde de ekstrema Rusia), evenka, oroĉena, negidala, solona. La sud-tunguzaj: nanaja, oroĉa, oroĉa, udega, ulĉa. La sud-okcidenta (manĉura) grupo: la manĉura kaj ghurĉena. (NdR el eo-Vikipedio.)

4. La **evenoj** apartenas al la tunguzoj de norda Siberio kaj norda ekstrema Rusia. La plej orienta grupo, ĉe la maro Oĥotsk, bredas boacojn kaj estas konataj de rusoj ekde la 17a jarcento, sub la nomo Lamutoj, “popolo de la oceano”

en la evena. La termino “evena” estis ekuzata malfrue pro la longa izoliteco de tiu popolo. (NdR el Vikipedio.)

5. La **evenkoj**, entute 70 0000 individuoj, estas tunguzaj popolo de Siberio, kulture proksima al la evenoj kaj ankaŭ ĉeesta en la nordoriento de Ĉinio. La censado de 2010 nombras 38 396 evenkojn en Rusio kaj 30 875 en Ĉinio. Ili ne praktikas ĉiuj la samajn religiojn: estas lamaistoj, ortodoksaj kristanoj, animistoj kaj ŝamanistoj. (NdR el Vikipedio.)

6. La **nanaja lingvo** apartenas al la tunguz-mancura lingvaro. Aliaj (malnovaj, sed uzataj) nomoj de la nanaja estas la golda, hugjena, hedzena, taza ktp. La nanajoj vivas ĉe la ĉina-rusa landlima regiono apud Birobiĝano, kie estas ankoraŭ dek mil personoj (2012), el kiuj nur 4 mil, ĉefe maljunuloj, plu scipovas la lingvon. (NdR el eo-Vikipedio.)



Pri lingvoj de la Rusa Federacio, vidu ankaŭ Etnismo no 88, 31.12.2011, grandparte dediĉita al la rusiaj lingvoj. (etnismo.org)

ĉar ni serioze pristudas tiun demandon kun mia kolego de “Lando de lingvoj”, pretigi mallongajn raportojn por scienca konferenco pri tiu ĉi problemo. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis leteron de ploranta virino, kiu estis insultita pro ŝia mokŝa⁹ akĉento. Kio damne estas tio?! Kiel en iu socio povas esti konsiderata normala preskribi kiel homo parolu. „Gramatiknazieco”, cetere, laŭ sia naturo estas tre simila fenomeno – provo peli sub premilon. Pri la ŝtatoficistoj mi jam parolis, kaj nun mi parolu pri la edukistoj. Ial la homoj opinias, ke la demando pri evoluigo de lingvoj estas zorgo de lernejoj instruistoj kaj ankaŭ la instruistoj ĝenerale subtenas tiun tendencon (samtempe riproĉante familiojn pri malbona edukado en familioj) anstataŭ kune labori pri la problemo. Alia premo venas de la etnismaj konservativuloj en la socio, al kiuj nenio plaĉas – nek

la lingva ŝanĝo, nek la paŭsoj el la rusa lingvo, nek la miksaĵo de lingvoj (ekz. de la rusa kaj de la burjata¹⁰, nek malbona kono de la etna lingvo ktp. Kaj ilia reago tre ofte silentigas multajn eventualajn aktivulojn. Por ĉiam. Kaj tiuj homoj en streĉa situacio preferas transiri al la defaŭlta lingvo de la plimulto.

Estas certe ankaŭ aliaj problemoj, sed ĉio estas solvebla. Se konstrui rilatojn bazitajn je reciproka estimo, kompleksa evoluigo kaj apogo al la homoj, aktivuloj, kiuj vidas ĉirkaŭ si antaŭ ĉio homojn kaj estas sentemaj al la lingva problemaro, tiam aperas la espero. (Aperas espero tiam, kiam oni konstruas rilatojn bazitajn je reciproka estimo, multflanka disvolvigo kaj apogo al homoj, aktivuloj, kiuj traktas bone aliajn homojn kaj kiuj vere estas sentemaj al la lingva problemaro – Rim. Mi

provis simpligi la tekston). Foje ni ellaboras specialajn konceptojn, kion fari pri tiu ĉi aŭ alia lingvo por helpi ĝian disvolvon.

5. Kaj kion ankoraŭ vi sukcesis fari? Kiujn planojn vi havas por la estonto?

Ĝis nun ni sukcesis fari malmulton, se paroli pri videblaj rezultoj. Ni okazigis kelkajn lingvajn festivalojn (du en Novgorodo, unu en Astrahano, kreis kelkajn retpaĝojn kaj komunumojn pri diversaj lingvoj: xisango.ru, zugaa.ru, warmaluw.ru – prilaborata), ni faris pli ol dekon da sciencaj raportoj, ni okazigis kelkajn kunvenojn por aktivuloj de minoritataj lingvoj en Moskvo, Ĥanti-Mansijsk, Sankt-Peterburgo, ni organizis helpe de amasfinancado ekspediciojn al nanajoj. Sed en nia aktivado por ni gravas ne tiom monhelpo kiom apartaj homoj. ■

7. La **tatara lingvo** estas la dua plej granda indiĝena lingvo de Rusio. Tiu tjurka lingvo estas oficiala en la Respubliko *Tatarstan*, Tatario aŭ Tatarstano. Oni ne miksu ĝin kun la krime-tatara lingvo, tute diversa kaj parolata en Krimeo. En Rusio la tataran parolas ĉirkaŭ 5,3 milionoj, signifa parolantaro ekzistas ankaŭ eksterlande: en Germanio, Finnlando, Usono kaj aliaj landoj. (NdR el eo-Vikipedio.) (Vidu ankaŭ **Etnismo-n** no 88 “Longe tiu sistemo ne eltenos” Intervjuo en Tatario, p. 9-11. etnismo.org)

8. La **udmurta lingvo** (udmurte уdmурт кыл - udmurt kyl) apartenas al la urala lingvaro, finnu-grupo. La udmurtoj nombras ĉirkaŭ 670 mil, sed la lingvon parolas nur 72,8 %. Ili vivas en la Udmurta Respubliko kaj en la ĉirkaŭaĵo. (Vidu ankaŭ **Etnismo-n** no 104, 2019) (NdR el eo-Vikipedio.)

9. La **mokŝa lingvo** estas parolata en la okcidenta kaj centra parto de la Respubliko Mordvio, de kie ĝi estas unu el la tri oficialaj lingvoj. Ĝi parenkas al alia mordva lingvo, la erzja; ili tamen ne estas interkompreneblaj. Ekzistas Vikipedio en la mokŝa lingvo.

10. La plej granda etna minoritato en Siberio, la **burjatoj**, rezidas en Burjatio kaj ankaŭ en najbaraj regionoj. Nun, plimulto de la burjatoj rezidas en *Ulan-Ude*, ĉefurbo de la respubliko, aŭ en ĝiaj apudurboj. Ankaŭ, pli tradicie, ili vivas en kamparo. Ili parolas la rusan kaj la burjatan lingvojn (tiu lasta tre proksima al la mongola). Burjataj kredantoj konfesas lamaismen, branĉon de budhismo, kaj tradiciajn kultojn. (NdR el eo-Vikipedio.)



Ankaŭ la prapopoloj devas fronti la Koronaviruson!

Nicole Margot

La unuan de majo oni povis legi sur la retejo de UN: «COVID-19: la Unuiĝintaj Nacioj por aktiva partopreno de la aŭtoktonaj popoloj en la riposto: en granda danĝero fronte al la malsano COVID-19, la aŭtoktonaj popoloj estas ne-

praj partneroj en la lukto kontraŭ la pandemio, jam nur pro sia fajna kono de la ekosistemoj, subtenas Unuiĝintaj Nacioj, ripetante sian alvokon respekti la rajtojn de tiuj vundeblaj loĝantaroj.»

Sed multnombros la gazetoj atentigantaj pri la aparta danĝero, en kiu troviĝas la prapopoloj, fronte al la nuna pandemio. La rigardoj

turniĝas ĉefe al Brazilo, kie troviĝas 60% de tuta Amazonio, kaj kie la ekstremdekstra politika reĝimo kuraĝigas la terposedantojn kaj la min-
ejajn kompaniojn pli kaj pli rabadi la indiĝenajn terojn. Vi certe legis tiajn artikolojn en via lingvo. Ni tamen faru rapidan ekzamenon de la situacio, laŭ artikoloj aperintaj ĝis la komenco de majo, konsciante, ke la

En nur kelkaj monatoj la ekstremdekstra prezidento Jair Bolsonaro duobligis la detruon de la tropika arbaro.

situacio rapide evoluos ĝis la apero de tiu ĉi numero.

«Kvankam mi traserĉis ĉion por trovi pozitivajn informojn rakontindajn, mi nenion trovis», avertis la ĵurnalisto de *L'Echo Magazine*, Cédric Reichenbach¹ «Komence de tiu ĉi jarmilo la senarbariĝo pliiĝis de 80% en 7 jaroj, irante de 28 000 km² da detruo en 2004 ĝis 4 600 km² en 2012.» De 2002 ĝis 2016 la Laborista Partio kun Lula kaj poste Dilma Rousseff ne komplete ĉesis ekspluati la amazonian arbaron, sed, sentemaj je mediprotektado, ili sukcesis limigi la senarbarigon. En nur kelkaj monatoj la ekstremdekstra prezidento Jair Bolsonaro duobligis la detruon de la tropika arbaro. La ĵurnalisto raportas, ke antaŭ sia elekto Bolsonaro avertis en *Twitter*: «se mi ricevas la povon, la indiano ne plu havos unu centimetron da tero.»

La unuaj viktimoj

La 13an de aprilo tri personoj el la aŭtoktonaj popoloj brazilaj perdis la vivon pro la koronaviruso: Janomana, adoleskanto 15jara el la ŝtato Rorajmo (en la nordo de Brazilo); 87-jara borarano, loĝanto de Alter do Chão, en la ŝtato Parao (en la nordo de Brazilo), kaj 55-jarulo en Manaŭso (en la nordokcidento de Brazilo). 23 suspektindaj kazoj estis traktataj laŭ oficialaj informoj.

«La indiĝenaj kaj priindiĝenaj organizoj maltrankvilas. Ili timas, ke nova “mikroba kolizio”, kiel jam pasinte okazis, venu “falĉi” la prapopolojn de la lando.»² La indiĝena asocio APIB (*Articulação*

dos Povos Indígenas do Brasil) memorigas la bezonon aktivigi la servojn pri indiĝena sano. Ĝi aparte timas la riskojn kreitajn de politiko pri kontakto kun la izolitaj popoloj³.

Danĝeraj kontaktoj kun la izolitaj popoloj

En la blogo de Bernard Comoli ni plu legas: «La Nacia Fondaĵo de la indianoj, FUNAI (*Fundação Nacional do Índio*)⁴ aŭdigis sin per dekreto, la 17an de marto. Ĝi starigas esceptajn kaj portempajn disponojn por lukti kontraŭ la disvastigo de Covid-19. Sed la artikolo 4 de tiu teksto maltrankviligas. Ĝi permesas al la regionaj kunordigaj instancoj ebligi kontaktojn kun indiĝenaj komunumoj izolitaj. (...) La 19an de marto, la Federacia Publika Ministerio sendis “rekomendon” al la prezidanto de FUNAI, petante ĝin ne kuraĝigi agojn ĉu laikajn, ĉu religiajn kaj ĉu terajn, riverajn aŭ aerajn, en la areoj proksimaj al la izolitaj popoloj. Ĝi same rekomendis nuligi tiun artikolon 4. Ŝajnas, laŭ la informretejo Basta⁵, ke tiu artikolo no 4 estis vere forigita: «Antaŭ du semajnoj, APIB, kun la helpo de la federacia publika Ministerio, sukcesis nuligi

3. Aŭ “nekontaktitaj popoloj” «estas komunumoj, kiuj vivas, aŭ vivis, ĉu pro elekto (popoloj vivantaj en libervola izoliteco), ĉu pro apartaj cirkonstancoj, sen signifa kontakto kun tutmonda civilizo. Malmultaj homoj restis komplete nekontaktitaj fare de tutmonda civilizo.» (Eo-Vikipedio).

4. Fondita en 1967, ĝi estas registara instanco je federacia nivelo, kiu starigas kaj aplikas la indiĝenan politikon de Brazilo.

5. Tiu artikolo, “Utiligante la sanitaran krizon, la senarbarigo, la prirabado de Amazonio kaj de la aŭtoktonaj teroj intensiĝas”, origine aperis la 14an de aprilo sur la retejo de sendependaj brazilaj informoj Agência Pública. Ties franclingva traduko, realigita de la asocio Autres Brésils, aperis la 1an de majo sur la retejo Basta, kun la permeso de la tradukintoj.

parton de dekreto de la prezidanto de FUNAI, Marcelo Xavier, kiu permesis al la regionaj kunordigantoj kontakti aŭtoktonojn izolitajn, kompleksa kaj delikata tasko plenumita de specifa servo de la institucio.»

Pri minaco al la izolitaj popoloj mi larĝe citos artikolon aperintan en *Le Courrier*⁶, kiu dialogas kun reprezentanto de la Neregistara Organizo *Survival International*: «La aŭtoktonaj popoloj konstituas hodiaŭ nur 0,4% de la brazila loĝantaro. Por sin protekti de agreso, kiu neniam ĉesis en la realo, pli ol cento da triboj restas izolitaj interne de la amazonia arbaro kaj malakceptas ĉiun kontakton kun la ekstero. Por ili, la Covid-19 signifas ne malpli ol “minacon de ekstermo” en la brazila politika kunteksto, taksas *Survival*, ĉar la prezidento, Jair Bolsonaro (...), kuraĝigas la fundamentismajn misiistojn kontakti tiujn izolitajn komunumojn, dum ĉi tiuj ne disponas imunan reziston por fronti la malsanojn venantajn el la ekstero.» Sarah Shenker, respondeculo de la dosiero ĉe *Survival*, klarigas: «S-ro Bolsonaro nomis en februaro protestantan misiiston en la Departemento por la nekontaktitaj popoloj ene de la Nacia Fondaĵo de la indianoj (FUNAI), la brazila registara organo taskita protekti la aŭtoktonajn popolojn. Kaj ne ajnan misiiston!» daŭrigas la artikolo: «Ricardo López Díaz laboris dum jaroj kun la *New Tribes Mission*⁷, unu el la plej grandaj fundamentismaj misiaj organizoj el Usono, kiu lanĉis planon por celi la popolojn ne kontaktitajn en la valo Javari, regiono, kie loĝas la plej granda nombro de tiuj komunumoj. Tiel, sub Bolsonaro, la publika institucio komisiita protekti la izolitajn popolojn fariĝas la avangardo de tiuj, kiuj endanĝerigas

6. “Fin des Mondes Isolés?” (Ĉu fino de la izolitaj mondoj?), *Le Courrier*, Christophe Kössler, 09.04.20.

1. Artikolo titolita: “Indiano ne plu havos centimetron da tero”, aperis en oktobro 2019, en *L'Echo Magazine*, kiu dediĉis tutan numeron al Amazonio, por pretigi la Poramazonian Sinodon okazintan en Romo, de la 6a ĝis la 27a de oktobro samjara.

2. Blogo de Bernard Comoli, *Tribune de Genève*. “Brésil, un danger supplémentaire pour les peuples” <http://bcomoli.blog.tdg.ch/>

ilin, nome de Jesuo,» resumas la organizo. Laŭ *Survival* la celoj de tiuj evangeliismaj misiistoj klaras. Sub la esprimita intenco evangeliizi la prapopolojn kaj ebligi al ili atingi la modernan komforton, kion tiuj popoloj klare ne deziras, kaŝiĝas malpli respektindaj celoj. «Krome *Bolsonaro* klare asertis: li volas kapti tiujn teritoriojn por favori la kvazaŭan “progreson”, reprezentitan de la minejoj, la arb-ara ekspluatado kaj la agroindustrio. Li tre bone scias, ke trude kontakti tiujn ĉi popolojn povas konduki al ilia kompleta elimino», opinias *Sarah Shenker*. Evident-ent-ent la ligoj inter unuflanke tiuj evangeliistoj kaj la bienposed-antoj, aliflanke la brazilaj entreprenistoj. «Ekzemple la filo de la prezidanto de *New Tribes Mission* en Brazilo, *Edward Luz Junior*, aperte fava al *Bolsonaro*, tre proksimas la agroindustrian lobion», daŭrigas la prezidantino de *Survival*.

Sed ĉiujn brazilajn aŭtoktonojn celas la politiko de *Bolsonaro*

«Pli ol nur tiujn izolitajn tribojn, la tuton de la aŭtoktonaj popoloj de Brazilo celas la politikaj komplotoj de la nova prezidanto, ekde lia enoficiĝo komence de 2019. Apenaŭ elektita, *Jair Bolsonaro* konfidis al la Ministerio pri agrikulturo, ege fava al agroindustrio, la respondecon pridesidi la limojn de la aŭtoktonaj teroj, nome por ke neniu teritorio estu plu atribuita al ili, kiel li estis aperte deklarinta», daŭrigas la artikolo. «Li ne ĉesis prezenti leĝojn kaj konstituciajn modifojn kun la celo uzi la aŭtokto-

najn terojn kaj malfermi ilin al la agroindustrio», memorigas *Sarah Shenker*. «Ĝis nun, neniu el tiuj leĝoj estis akceptita, sed tiuj intencoj esprimitaj de la registaro, akompanataj de koloniismaj kaj rasismaj deklaroj flanke de s-ro *Bolsonaro*, kuraĝigas ĉiaspecajn koloniantojn, kiuj invadas la teritoriojn janomamoj, *Kawahiva*⁸, *Awa*⁹, ktp.: arbohakistoj, industriaj bredistoj kaj orserĉantoj kreskigis siajn agadojn en la rezervejoj kaj rande de ĉi tiuj, provokante la gigantajn incendiojn de la pasinta aŭtuno.»

Kaj nun aldoniĝas la minaco de la koronaviruso

En 2019 la registaro reduktis la sanservojn destinitajn al la indiĝenoj, servojn prizorgatajn de la Speciala Sekretariejo pri Indiĝena Sano (*SESAI*), el kiuj profitas ĉirkaŭ 800 000 personoj. Tio okazis post provoj simple malaperigi tiujn sanservojn, memorigis fine de la jaro *APIB*. Tiu redukto igas hodiaŭ la aŭtoktonojn pli vundeblaj je ĉiaspecaj afekcioj, inter ili la koronaviruso. Ili estas ankaŭ potenciale pli endanĝerigitaj pro sia komunuma vivmaniero. La aŭtoktonaj komunumoj de Amazonio kalkulas precipe je la laboro de siaj komunumaj estroj, de la priindiĝenaj entoj kaj de la surterenaj profesiuloj pri sano, kiuj, preskaŭ solaj, gvidas militon kontraŭ la viruso.

8. La popolo *Awa* estas unu el la lastaj grupoj da nomadaj ĉasistoj-kolektantoj en Brazilo. Ili vivas en la orienta parto de la amazonia regiono en la ŝtato Maranjo. Ili ĉasas, fiŝkaptas kaj en la arbaro kolektas nuksojn aŭ sovaĝajn fruktojn. Ili nombras nur ĉirkaŭ 450, el kiu 100 ankoraŭ neniam kontaktis la eksteran mondon.

9. La popolo *Kawahiva* estas izolita popolo, kies anoj vivas en la amazona arbaro en Brazilo, kiel ĉasistoj-kolektantoj, malmulte konataj, preskaŭ sen kontaktoj kun la aŭtoritatoj ĉar ili supervivis al multaj atakoj por ilin ekstermi.



«Mankas materialo por individua protekto, vakcinoj kontraŭ gripo kaj materialo por testi la koronaviruson ĉe personoj, kiuj prezentas simptomojn de infekto», klarigas *Sonia Guajajara*¹⁰. «Nur en la teroj de la janomamioj, estas jam pli ol 30 000 ministoj», raportas la kunordiganto de la misia indiĝena konsilio (CIMI), *Antonio Eduardo Oliveira*, dum, ĝis la fino de la lasta jaro, 20 000 ministoj estis nombritaj. Laŭ *Eduardo Oliveira*, la sanitara krizo eĉ pli malfortigis la kontrolojn kaj malfermis breĉojn al la agoj de la invadintoj. Laŭ li, *SESAI* havas neniun antaŭvidan planon pri urĝaj disponoj aŭ izolado, kaze ke la malsano progresus en la aŭtoktonaj komunumoj. Sed *Robson Santos Silva*, sekretario en tiu indiĝena asocio pri sano, asertis al *Agência Pública*, ke *SESAI* ja organizis sian agadan programon por akompani la evoluon de la malsano. «La plano estas movebla kaj povas esti modifita je ĉiu etapo», deklaris li. En videofilmo publikigita sur la retejo de *SESAI*, *Robson Santos Silva* indikas, ke la plej komplika fazo komenciĝis meze de aprilo. Li alvokis la aŭtoktonajn loĝantarojn resti izolitaj en siaj komunumoj. *SESAI*, daŭrigis li, okupiĝas pri la baza sano en la indiĝenaj distriktoj, dum la nacia servo pri brazila sano (*SCIATJ*) okupiĝas pri ĉiuj, inkluzive de la plej gravaj kazoj de aŭtoktonoj infektitaj.

Nekontrolataj iroj kaj revenoj far ekspluatantoj de kontraŭleĝaj minejoj konstituas nuntempe grandan defion por la prisanaĵ

7. La *New Tribes Mission*, antaŭ nelonge renomita *Ethnos360*, disponas je proksimume 3200 misiistoj, sendataj en pli ol dudek landojn kun la celo evangeliizi pli ol 6500 popolojn, kiujn ili nomas la “ne-atingitaj”, “popolojn, kiuj ankoraŭ neniam aŭdis la mesaĝon de la Evangelio”. El *Le Courrier*.

profesiuloj kaj la estroj luktantaj por eviti ĉiun kontakton kun la viruso. «Ni postulas, ke la sekurec-agentejoj forpelu la invadintojn el la indiĝenaj teroj. La risko de kontaĝo tujas», deklaras *Sonia Guajajara*. Laŭ *APIB*, ĉe la sanitara krizo kaj la redukto de la kontroloj far la federacia polico kaj la armeo, la kontraŭleĝa ekspluatado de minejoj kaj la rabado de teroj multobligas en Amazonio.⁵

Kunordiganto de la indiĝenista konsilio de Rorajmo (*CIR*), *Enoque Taurepang* raportas: «La situacio estas komplika. Ni havas problemojn kun la enmigrado, la kontraŭleĝa mina ekspluatado kaj nun kun la fuĝo de homoj, kiuj forlasas la urbojn por rifuĝi en la vilaĝojn kaj la kamparajn areojn. Ni laboras kun la grupoj por kontrolo de nia teritorio. Sed tiuj personoj, solaj, sen ekipaĵo, ne povas fari tiun laboron, ĉar ankaŭ ili riskas trafiĝi de tiu malsano»,

avertis la kunordiganto de *CIR*. *Enoque Taurepang* transprenis la gvidadon de *CIR* lastjare. Li estas la estro de la komunumo *Araçá* en la municipo *Amajari*, la limo kun Venezuelo, kie 53% de la loĝantaro estas aŭtoktona. La indiĝenan vilaĝon loĝas inter 1800 kaj 2000 personoj, kiuj laŭ li suferis jam migran fluon de tiuj, kiuj alvenas en Brazilon per la vojo nro BR-174. La projekto de *CIR* pri izolado volas kontroli la revenon de individuoj el malsamaj etnoj, kiuj vivas en la urboj kaj kiuj, fronte al la timo de kontaĝo, serĉas rifuĝon en la kamparaj areoj. «Nia ĉefa celo estas instali barilojn ĉe la enirejoj de la teritorioj, por ke la loĝantaro ne-aŭtoktona ne eniru kaj la aŭtoktona ne eliru. Se necesas esplori formon de subteno al la familioj, tio okazu laŭ organizita maniero. Ni faras tion, kion ni povas, haltigante plene la vivon de la komunumo por batali

kontraŭ la viruso kaj supervivi sur niaj teritorioj», detalas *Enoque Taurepang*. Li memorigas, ke tamen malfacilas konvinki patron de familio izolita, kiam li devas iri ĉasi kaj fiŝkapti. «Ne eblas peti al la patroj resti interne dudek kvar horoj je dudek kvar, ĉar ili perlaboras nenion, ricevas nek salajron, nek apogon.»

En la nacia Kongreso, la aŭtoktonan reziston al la koronaviruso gvidas la deputitino *Joenia Wapichana* (de la partio *Rede-RRR*), kunordiganto de la komuna parlamenta Fronto por la defendo de la rajtoj de la aŭtoktonaj popoloj. *Wapichana* asertis, ke la aŭtoktonaj popoloj rapide kaj firme agis por malhelpi la Covid-19 disvastiĝi en la vilaĝoj. En la Parlamento, *Wapichana* povas kalkuli je aliancantoj. Kun aliaj parlamentanoj, ŝi proponis projekton de leĝo, kiu devigas la ŝtaton trovi kromajn rimedojn favore al la indiĝena sano.⁵ ■



Sonia Guajajara

10. Naskita inter la popoloj Guajajara/Tenetehara, *Sonia Guajajara* posedas beletran kaj flegistan diplomojn kaj superan diplomon pri faka edukado de la ŝtata universitato de Maranjo. Ŝi estis la unua aŭtoktona virino kandidata al la vic-prezidenteco de Brazilo, en 2018. Ŝi estis iama vic-kunordiganto de la aŭtoktonaj organizoj de brazila Amazonio (*COIAB*). Nuntempe ŝi estas kunordiganto de la indiĝena asocio (*APIB*) kaj partoprenas en la konsulta konsilio de la interreligia Iniciato por la tropikaj arbaroj en Brazilo.